

n-ro 58

oktobro 1997

## Peranto por Ĉeĥio

S-ro Vladislav HASALA (IKEF 227) proponis sin por la funkcio de IKEF-peranto por Ĉeĥio. Konforme al la Regularo por perantoj, aprobita de la estraro dum la 80a UK en Tampere (1995) la prezidanto kaj la kasisto de IKEF proponas lian nomumon. La nomumo iĝos definitiva se neniuj malaprobos ĝin ĝis 5 januaro 1998.

FJB/RR

## Enhavo

Projektpropono Kees Ruig .....	3-4
Raporto pri la IKEF-kunsido dum la UK .....	5
Anoncitaj aranĝoj .....	6
Enkonduko de la eŭro - kalendaro - Nova EJA-revuo .....	7
Kotizpago per respondkuponoj - Terminologio .....	8
Komercaj petoj kaj proponoj .....	9
Konstruado - Interredaktore - Patentoj - Tradukprojekto .....	10
Projektoj favore al meza kaj orienta Eŭropo .....	11

---

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu!

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

La **jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD). Kiu aliĝas meze de la jaro, pagu por 18 monatoj (900 aŭ 600 BEF).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c  
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonnumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj). La IRK estu stampitaj de la eldonanta poŝtofiĉejo.

**Perantoj**:

**Cinio**: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

**Francio**: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)

---

Germanio: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgründestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapeŝt XIII

Italio: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pŝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

---

## Projektoprono

Antaŭ kelkaj jaroj mi aperigis artikolon pri la rolo de Esperanto en la internacia komerco en 'La Merkato' (n-ro 44) kaj 'Eventoj' (n-ro 58 - kopiita sur la sekvanta paĝo). Mi akcentis la gravecon de la komerca perado.

Nun mi volas diveni ĉu vere eblas fondi tian profesian reton kiel projekton de IKEF. Mallonge mi ripetu la celon de la projekto, jam priskribita en 1994.

La celgrupo estas la internacia komercistaro (ĉu E-parolanta aŭ ne). La perantoj estu bonaj Esperantistoj, ne necese komercistoj. Sed ili pro sia (eks-) profesio ja posedu bonajn personajn kontaktojn en diversaj terenoj: registaro, aŭtoritatoj, komerco, industrio, servo-institucioj. La komercistoj aŭ industriaj entreprenoj kiuj volas establi rilatojn en iu lando kaj deziras informojn, helpon, kontaktojn... povas peti helpon de la peranto kiu disponigas sian rilataron al la kliento. La celo de tiaj kontaktoj povas esti importado, eksportado, kunlaborado, 'franchising', loka produktado, komun-agado ('joint-venture'), fondiĝo de filio, aĉeto de loka firmao...

### Laborskemo:

La kliento (petanto) petas helpon de samnacia IKEF-ano. Li tradukas la peton esperanten kaj kontaktas 'retanon' en la cellando. Tiu faras la petitan kontakton, eventuale tradukas. Se estas lingvoproblemoj, la IKEF-anoj restas perantoj; se ne, la faritaj kontaktoj disvolviĝu rekte.

La kliento pagos tarifon por la IKEF-helpo.

Se vi interesiĝas pri la partopreno en profesia perado IKEF-reto, bonvolu skribi al mi poŝte aŭ fakse la jenajn personajn informojn:

1. nomo, adreso, telefono, telefakso
2. (eks-)profesio, okupo
3. aĝo, ĝenro
4. kapableco pri kiaj kontaktoj
5. referencoj

---

6. IKEF-membreco: jes/ne

Inĝ. Kees RUIG

Adreso: p.a. Ĉambro de Komerco kaj Industrio, Poŝtfako 9292,  
NL-6800 KZ ARNHEM, Nederlando; telefakso: +31-24-3790506.

---

Teksto Eventoj

---

## Raporto de la IKEF-kunsido en la adelajda UK

Okazis ĝi kun la partopreno de 17 membroj. Estrarano Yamasaki prezidis kaj difinis la neoficialecon de tiu ĉi informa kunsido pro la ĉeesto de nur unu estrarano, en kiu ni diskutu libere. Li petis parolon de prof. Li Chong-Yeong, prezidanto de UEA kaj IKEF-membro, kiu diris ke li ne vigle agadas kaj ne kontribuis multe al la agado de IKEF en la pasinta jaro. Poste ĉiu laŭvice parolis.

\* S-ro Oba, Japanio, kiu estas ĉiamulo de IKEF-kunsido, bedaŭris pri manko de vizito al loka entrepreno, kutime organizata de prezidanto Braun. S-ro Van den Kieboom, Belgio, diris ke li reprezentas d-ron Polerani, komitatano A por IKEF en la komitato de UEA.

\* S-ro Ledon, Brazilo: Prezidanto Braun venis al Brazilo, al kiu li demandis kion s-ro Braun pensas pri la tutmondigo de la ekonomio. Li metis la saman demandon al la ĉeestantoj. S-ro Kerbel, Israelo, bankisto: Gravas kiel oni povas uzi E. por sukcesigi sian negocon. S-ro Syōzi, Japanio: Li estas komercisto-industriisto kaj dungas e-iston por interpretado pro la fido kiun li povas meti en tiu ĉi. Tiel li povas protekti sin ĉar aliaj ne povas kompreni interkonsiliĝon inter la du. S-ro Zhao, Ĉinio, engaĝiĝas en turismo kaj sentas ke E. estas utila. S-ino Wang Xue, Ĉinio: Ŝi estas en la konstrua industrio kaj deziras ke oni venu al Ĉinio kaj investu en ŝia entrepreno. Iu konsilis ŝin kontakti TAKE. S-ro Tom Eliot, emerita komputilisto el Aŭstralio, diris ke la malbona konjunkturo en Aŭstralio tuŝas lin pro la malfavora kurzo de la valuto malfaciliganta pagon de kotizoj.

\* S-ro Ledon reprenis sian argumenton. La tutmondigo de la ekonomio bankrotigis multajn entreprenojn brazilajn, eĉ grandajn, per libera konkurenco. Konsumantoj estas neglektataj; kapitalo maldungas laboristojn, anstataŭante ilin per robotoj, sed robotoj ne povas aĉeti. La ekonomio ne estas en ordo.

\* S-ro Li, Ĉinio, emfazis neceson por sciigi ne-e-istojn pri ekzemploj de la utiligo de E. S-ino Syōzi, Japanio, demandis kio estas TAKE, kion s-ro Ledon klarigis. La prezidanto petis d-ron Wandel, UEA-estraranon pri faka agado, paroli. Li diris ke li pensas ke la rolo de fakaj asocioj estas granda, eĉ pli granda ol tiu de landaj asocioj. Li koncentras sian agadon sur kontakton kun UNESKO, precipe pri lingva demando. Dum CO de

---

UEA okupiĝas pri rilatoj kun fakaj asocioj, li klopodas en la tereno de internaciaj eksteraj rilatoj kun neregistaraj organizoj, vizitante ekz. du fojojn Parizon.

\* S-ro Ledon demandis al d-ro Wandel pri ekologio, al kiu tiu ĉi respondis ke ĝi estas delikata temo ĉar NRO ne konscias pri lingva problemoj tiel ke ni devas marŝi singarde.

YAMASAKI Seikō

## Anoncitaj aranĝoj

**Kathmandu, Nepalo, 26 februaro - 7 marto 1998:** 2a Internacia Himalaja Renkontiĝo. Informoj kaj aliĝilo: Sierra Travel and Tours (P) Ltd., P.O. Box 3565, Kathmandu; fakso 00977-1-228194.

**Unua Rusa Sanmarineca sesio de AIS, Moskvo, 1998.03.22-29:**

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino okazigos sian unuan oficialan universitatan studadsesion en Rusio. PSUS/RU okazos fine de marto 1998 en apudmoskva domo de la Rusa Akademio de Sciencoj, situanta ĉe la rivero Moskva en bela arbora pejzaĝo. Krom la necesaj ejoj por kursoj kaj prelegoj la domo ofertas komfortajn kaj favorprezajn unu- kaj dultajn dormĉambrojn, tiel ke la kongresanoj povos loĝi endome.

AIS per tiu kongreso respondas al la granda intereso, kiu ekzistas en Rusio pri sciencaj aranĝoj en Esperanto. Krom sciencaj prelegoj, PSUS/RU proponos ankaŭ kursojn sur proksimume abiturienta nivelo, tiel ke ne nur profesiaj sciencistoj povos profiti de la programo. La ekzamenoj por akiro de sciencaj gradoj estas publikaj kaj certe prezentos interesan okazaĵon, ne nur por eblaj estontaj kandidatoj. AIS antaŭvidas ke multaj esperantistoj kun ĝenerala scienca intereso aliĝos al PSUS/RU, nelaste ĉar estos ebleco pasigi liberan semajnon en Moskvo post la konferenco.

Por aliĝi aŭ peti informojn eblas turni sin al la Senata Sekretario de AIS, s-ino ADoc. Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio, tel. +49-551-

376072 aŭ uzi la retpoŝtan adreson <psusru(a)wiwi.hu-berlin.de>. Interreta informo (kun aliĝilo): <http://www.forst.uni-muenchen.de/OTHERS/AIS/arangxoj/psusru.html>. Aliĝante per retpoŝto bonvolu skribi konfirmi al la Senata Sekretario.

Kvankam la internacia lingvo Esperanto estos la precipa laborlingvo kaj la sola kurslingvo, oficialaj lingvoj estos krome la rusa, angla, germana, franca kaj itala.

**Pekino, Ĉinio, 19-25 aŭgusto 1998:** Sesa Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. Samtempe okazos Internacia Somera Semajno por Geknaboj kaj Gejunuloj. Informoj: Sciencista Teknikista Esperanto-Asocio, ĉe Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, CN-100864 BEIJING; fakso: 0086-10-6851-2458; rete <lrf(a)lasgsgi4.iap.ac.cn>.

### Enkonduko de la eŭro en la Eŭropa Unio: Kalendaro

Tempo	Agado
ĝis 30 junio 1997	- leĝaro pri eŭro - pakto pri stabileco - desegno de moneroj
laŭeble rapide, dum 1998	decido pri partoprenontoj membro-ŝtatoj
dum 1998	- kreo de ECB (Eŭropa Centra Banko) - ekproduktado de eŭro-moneroj kaj -biletoj
1 januaro 1999	- definitiva fiksado de kurzoj - ekvalidiĝo de leĝaro - internaciaj transakcioj en eŭroj - eldono de obligacioj en eŭroj
1 januaro 1999 ĝis (plej laste) 1 januaro 2002	- financa mondo adaptas sin al eŭro - helpo al ekonomio por bonorda ŝanĝo
1 januaro 2002 (plej laste)*	- eŭro-moneroj kaj -biletoj ekcirkulas - publika administrado transiras al eŭro
1 julio 2002 (plej laste)	naciaj valutoj ne plu estas leĝaj pagiloj

\* Ĉar je la jarŝanĝo abundas administraj taskoj, multaj preferas enkonduki la biletojn jam en septembro-oktobro 2001 kaj fini la transiron je 1 januaro 2002.

Bazita sur informoj aperintaj en Infeuro 3, majo 1997 (dumonata novaĵletero pri la eŭro eldonita en angla, franca kaj germana de la Eŭropa Komisiono, EUROP - Infeuro, B.P. 2201, L-1022 Luksemburgo). Detalaj informoj ankaŭ haveblas rete: <http://europa.eu.int/euro/>.

---

### EJA havas novan revuon

Ĝus aperis la unua numero de Jura Tribuno Internacia, oficiala organo de Esperanta Jura Asocio. Kunlaborantoj estas bonvenaj. Redakcio: José María Rodríguez Hernández, Apartado de Correos 3142, E-14080 CORDOBA, Hispanio; rete <joser(a)lander.es>.

### Kotizpago per respondkuponoj

Eblas pagi la IKEF-kotizon per internaciaj respondkuponoj. Nuntempe unu kupono valoras 34 belgajn frankojn. Tamen, la kuponoj estu stampitaj de la eldonanta poŝtoŭficejo. Kvankam sur la kuponoj estas indikite ke stampilo estas nedeviga, mia loka poŝtoŭficejo ne akceptas kuponoj sen indiko de eldonlando.

RR

### Terminologio (laŭ Eventoj 128)

\* Giuseppe VALENTE, via le Ledra 4, I-33100 UDINE, Italio, faris fotografan fakvortaron enhavantan la E-difinon de ĉ. 500 nocioj. Enestas vortlistoj en angla kaj itala lingvoj. La listoj ankaŭ ekzistas sur diskedo. La tuto estas uzebla, sed ne eldonpreta. Kunlaboro de tekniklingve spertaj Esperantistoj estas serĉata.

\* Jura vortaro eldonita en Internacia Instituto de Administro, Entrepreno kaj Juro. Malmole bindita, 2500 vortoj kaj esprimoj en rusa, Esperanta, ukraina kaj angla lingvoj. 16 USD inkl. de sendkostoj ĉe: Dmitrij Cibulevskij, a/ja 9307, UA-31003 HARVIK, Ukrainio.

[anonco Ebenau]

---

### Komercaj petoj kaj proponoj

#### **Angolo**

Mi bezonas 100 pneŭojn por kamionoj 11/20 aŭ 12/20 prilaboratajn aŭ malmultekostajn. Bv. sendi prezoferton (CIF Luanda) al J.C. NSOKO-TUKIFIMPA-NKWANGI, C.P. 399, LUANDA, Angola. Ankaŭ interesiĝas pri kreo de komuna firmao por importo/eks-porto. Angolo produktas petrolon, diamanton, kafon, lignon.

#### **Aŭstralio**

'Nu Skin', vendanto de flegiloj por haroj, buŝo, haŭto..., serĉas vendantojn en Usono, Kanado, Japanio, Tajlando, Koreio, Makao, Honkongo, Tajvano, Aŭstralio, Novzelando, Gvatemalo, Puertoriko, Meksiko, Irlando, Britio, Francio, Nederlando, Germanio, Hispanio, Italio kaj Belgio. Kontakto (prefere esperante, germane aŭ angle) s-ron Trevor STEELE, Unit 1, 297 Upper Heidelberg Road, IVANHOE 3079; rete <tsteele(a)patash.com.au>

(el TAKE - LA DOMO 15)

#### **Bulgario**

Mi deziras vendi al EU: littukojn, puloverojn, ŝtofojn. Inĝ. Marian IVANOV, j.k. Zlaten Rog 27 et. 11 st. 373, BG-8000 IMBOL.

#### **Estonio**

Komerccela interŝanĝo aŭ aĉeto de ĝardenaĵoj (semoj, floroj, ĝardenlaboriloj). Ofertataj: alpinaraj plantoj, plantaĵmaterialoj de multjaraj floroj (gladioloj, tulipoj, narcisoj, klematiroj, dalioj, lilioj, ktp.). Petataj: legomaj kaj floraj semoj, laboriloj, regule tranĉitaj floroj (diantoj [se liveritaj en Litovio: pagos po 0,20 USD], rozoj, gerberoj). Arvu Toomsalu, Kopli 45, EE-0003 TALLINN, Estonio. Tel. (vespere) 3722474728, fakso 3726327159.

#### **Kongo (eks-Zairio)**

Por krei esperantistan laboron, la Grupo de Esperantistaj Agronomoj (GEA) serĉas bonvolajn homojn kaj asociojn kiuj povas liveri al ili donace:

- semojn (de tomato, karoto, brasiko, poreo, aliaj legomoj), ĝardenajn semojn, ktp.
- modernajn uzitajn agrikulturajn kaj bredajn materialojn.

---

Adreso: GEA, s/c Kizeyidioko, B.P. 29, Mbanza-Ngungu, Bas-Congo, Rép. Dém. du Congo

#### **Kameruno**

Deziras kunlaboron pri agrikulturo, fiŝado, metalurgio, ligno kaj lignosegado. Jean-Marie Mboge-Mbele (IKEF 18), B.P. 1816, Douala, Cameroun. Fakso (237) 42-77-03.

#### **Interŝanĝo de spertoj rilate al konstruado**

Afrika kandidat-arkitekto deziras korespondi kaj interŝanĝi ideojn pri konstruado de domoj, akordigante tradiciajn kaj modernajn metodojn, kaj pri uzo de pluvakvo por akvumado de rizejoj. S-ro Alain Pierre Roger COLY, p.a. Ecole Nationale des Arts, BP de l'Est, Point E, DAKAR, Senegalio.

(el TAKE - LA DOMO 15)

#### **Interredaktore: perreta poresperantista informilo**

En aŭgusto 1996 la redaktoro de la revuo Eventoj lanĉis servon 'Interredaktore', kiu iĝis la kunlabora forumo de Esperanto-gazetoj pere de interreto.

Ĉ. 90 redaktoroj (+ UEA- kaj TEJA-estraranoj) ricevas diversajn informojn, artikolojn, petojn... Dum la unua jaro estis dissenditaj 388 mesaĝoj, averaĝe 1,5 en ĉiu labortago.

Ankaŭ vi povas utiligi la servon. Se vi volas komuniki ion al E-redaktoroj aŭ se vi havas iun interesan (movadrilatan) informon, sendu retmesaĝon al <eventoj(a)hungary.net> kun la mencio, ke la mesaĝo estas por 'Interredaktore'.

#### **Eŭropa Unio: nova regularo pri patentoj**

En la EU nun ekzistas diversaj (naciaj kaj transnaciaj) regularoj por registri patentojn. Ĉar la nuna sistemo estas komplika kaj multekosta (nur la tradukkkostoj atingas meze 25.000 DEM), oni planas ellabori novan regularon. Prepare al tio kaj por sondi la opiniojn, la komisiono eldonis broŝuron ('green paper') en kiu ĝi skizas la nunajn procedurojn kaj petas la opinion de la interesatoj. Reagoj alvenu plej laste je 7 novembro 1997.

---

Referencoj de la broŝuro: COM(97)314 def; ISBN 92-78-21655-0 (nederlandlingva versio) kaj 92-78-21652 (anglalingva versio); kataloga numero CD-CO-97-309-[lingvokodo]-C. Ĉe RR haveblas unu nederlandlingva kaj unu anglalingva ekzemplero. Alia, anglalingva broŝuro 'The present state of the patent system in the EU', komparas la patent-sistemojn de EU, Usono kaj Japanio. Ref.: cat. CD-NA-17014-EN-C, 75 p., prezo 8,50 ekuoj.

#### **TACIS-tradukprojekto: mankis reagoj**

En La Merkato 57, p. 8, mi demandis ĉu utilis traduki la broŝuron 'Be successfull...' esperanten. Venis kelkaj reagoj el eksa SU; tamen por tiu regiono verŝajne plej bone uzeblas la rusa versio. El landoj en kiuj laŭ mi devus esti relative granda intereso (Ĉeĥio, Hungario, Pollando...) ne venis reagoj. Mi do konkludas ke granda tempo- kaj mono-investo en traduko ne estas oportuna.

RR

---

### Projektoj de Eŭropa Unio favore al meza kaj orienta Eŭropo

**PHARE** subtenas reformojn en meza kaj orienta Eŭropo (Albanio, Bulgario, Estonio, Hungario, Latvio, Litovio, Makedonio, Pollando, Rumanio, Slovenio, Slovakio, Ĉeĥio). Estas kvin prioritaj celoj: agrikulturo, klerigo, medio, energio kaj investoj. Ĉiujare programoj estas difinitaj kun koncernataj landoj kaj la Eŭropa Komisiono.

**JOPP** (Joint Venture Phare Programme) celas kreon kaj disvolvigon de kunaj entreprenoj en la PHARE-landoj,  
- per kredito aŭ subvencio por prepara studo aŭ provprojekto,  
- per kuna financado (kredito aŭ kapitalo) de projekto,  
- per teknika asisto post la investo (senrenta prunto).

**TACIS** subtenas ekonomiajn reformojn en la eksa Soveta Unio per teknika asisto. Ĝi ankaŭ stimulas komercon inter eksa SU kaj EU. Prioritatoj: manaĝado kaj restrukturigo (ekz. de ŝtataj organizoj), produktado kaj distribuo de nutraĵoj, energio, infrastrukturo. Projektoj estas elektitaj surbaze de plurjaraj programoj.

(RR - bazita sur informoj senditaj de Kees Ruig)

### Re-aliĝo

129. S-ro Janusz KRUPSKI - Yolam Invest Sp. z.o.o., ul. Brukowa 16-18, PL-91-341 LODZ, telefono+fakso +48-42-519309. Vendas/aĉetas aŭtomobilojn kaj iliajn partojn, ŝuojn, tekstilaĵojn.

---

### Distribuantoj en la tuta mondo serĉataj

Altkvalita varo (jam milionfoje vendita en Germanio) "CD-ROM"-oj (kompaktdisko por komputilo). Enhavo: softvaro/ludoj/lerniloj. Uzataj lingvoj: angla kaj germana. Prezo por vendejoj: ĉ. 10 USD.

Se vi estas profesia distribuanto aŭ bona vendisto kaj kapablas vendi ĝin multfoje al vendejoj en via lando, bondolu kontaktu:  
Rainer KURZ, Plettenbergstr. 19, D-70186 STUTTGART,  
Germanio, telefono +49-172-710 5378, fakso +49-7181-22 333



---

E-2000